

Kulturaj Kajeroj

E.MAHE

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Jarabono : 60 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

JANUARO - FEBRUARO

1983 - 1

KULTURAJ KAJEROJ

1983 JANUARO-FEBRUARO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86000 Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Artmetioj en Grésillon S. Sire

Pri la mito de Kasandra F. Boyet

Paĝo de la geknaboj A. Childs-Mee

La profeto K. Gilbran
trad. S. Boniol

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

Iom post iom preciziĝas la detaloj de la venontsomera programo.

Por la unua periodo la listo de la prelegontoj kompletiĝis. Jen ĝi : E. Bormann, W. Bormann, F. Boyet P. Métivier, H. Röllinger, F. Roose, G. Silfer. La temoj prezentitaj estos, kiel kutime, diversaj. Jen kelkaj titoloj : « La nova komunikado », « La Eŭropa Komunaĵo kaj ĝia lingvo-problemo », « Scienca laboro pri Esperanto », « Komuna problem-solvo por la Eŭropa Komunaĵo », « Virina Agado en kaj ekster la Esperanto-movado », « Historio de la mondlingva ideo », « Orientaj aspektoj de l'Okcidento ». « Historiaj Kulturoj : kiom ili reciproke rilatis », « Edmond Privat : lia rolo en la Esp-kulturo ». Aliaj titoloj aldoniĝos aŭ prefere preciziĝos. Dum tiu periodo ankaŭ okazos kursoj gvidataj de A. Childs-Mee kaj J. Turbillon.

Inter la unua kaj la dua periodoj, la 23-an kaj 24-an de julio, kooperativo Literatura Foiro organizas semajnfinon, kies programo konsistos el progresiga kurso (gvidos S. Bourot), perfektiga kurso (gvidos P. Martinelli), G. Silfer gvidos studgrupon pri « Estetiko kaj poetiko en la Esp-Literaturo ».

La dua periodo estos relative sensurpriza ĉar ĝi estos dediĉita al la kutimaj tri kursoj diversnivelaj. El la pasint-jaraj gvidantoj ni retrovos A. Childs-Mee kaj Robert Lloancy. Ni speciale insistas pri la fakto, ke la kursoj, same kiel dum la unua periodo, estos gvidataj nur en Esperanto (eĉ la unuagrada). La lernantoj estos diversnaciaj.

La tria periodo estos pli nova pro tio, ke dum la lastaj jaroj preciziĝis la rolo de la instruado de artmetioj en la kono kaj praktikado de Esperanto. La gvidantoj donos klarigojn nur en Esperanto kaj la kursoj koncernos la studon de la tekniko kaj la realigo de objektoj. La aliĝantoj devos alporti iom da simpla materialo kaj ilojn kiel fotoaparaton, tondilon, fadenon, ŝtofpecojn, ktp. (listo estas sendita al la informpetantoj).

Por la unua fojo periodo dusemajna (la kvara) estos organizita de F.U.B.E. por la blinduloj kaj por la vidantoj. La programo, certe interesa por ĉiuj, entenas kursojn, prelegojn kaj distraĵojn.

Vi verŝajne trovos programeron kiu plaĉos al vi. Ne atendu por peti informojn.

La administrantoj de la Esperantista Kulturdomo deziras al la legantoj de « Kulturaj Kajeroj » feliĉon kaj sanon por la jaro 1983.

Esperanto tra la Mondo

Por la universala kongreso

— Ampleksa loka kongresa komitato estis organizita en Budapeŝto kie oni atendas plurajn milojn da partoprenantoj por la 68a universala kongreso de Esperanto.

— Dum tiu kongreso, okazos Cseh-metodaj kursoj, interalie por komencantoj. Por tiuj kursoj, oni esperas varbi ankaŭ familianojn de la kongresantoj.

— Unuiĝo Franca por Esperanto, kiel aliaj naciaj asocioj, preparas karavanojn por la vojaĝo (rilati kun S-ro A. Debertonne, 9, rue du Vieux-Versailles, 78000 Versailles).

— Infana kongreseto estas antaŭvidata.

Teatraj trupoj denove en Hungario

Pro la sukceso de la Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj en Budapeŝto, lastan jaron, nova manifestacio okazos dum Marto (18a — 27a).

Interparlamenta Esperanto-grupo

Interparlamenta Esperanto-Grupo (IPEG) estis fondita la 27an de Oktobro en Strasburgo (Francio).

En ĝi povas membri deputitoj en la naciaj parlamentoj aŭ anoj de interŝtataj parlamentaj instancoj, kia estas Eŭropa Parlamento.

Al la fondkunveno, venis 13 eŭropaj parlamentanoj el Belgio, Britio, Francio, F.R. Germanio kaj Irlando.

Oni scias ke la brita parlamenta esperanto-grupo membras nun pli ol 140 anojn !

Por rilati kun tiu nova interparlamenta grupo, skribi al IPEG, Esperanto-Centro, 140, Holland Park Avenue, London, Britio W 114 UF.

De nun, revuo kun tekstoj por komencantoj

Ek de nun, post transformo, duono de ĉiu numero de la revuo « Kontakto » aperas en facila formo por liveri tekstojn adaptitajn por la komencantoj.

La mondcivitanoj uzas Esperanton

— Mondanista Gazet-Oficejo (AMIP) eldonas presbultenojn por la Esperanto-gazeto, pri la mondanismaj problemoj. Adreso : Citoyens du Monde, 15, rue Victor-Duruy, 75015 Paris.

— Nun, « Monda Solidareca Fonduso kontraŭ la Malsato » kreita en la sama medio, decidis uzi la internacian lingvon.

Manifestacioj, renkontoj 83 (sekvo)

— Internacia Esperanto-Kursejo de Pisanica (Bulgario) : multaj periodoj de dusemajnaj kursoj dum la jaro. Skribu al : Internacia Esperanto-Kursejo, pk 791, BG-1090 Sofia, Bulgario.

— En Varna, ĉe la maro, ankaŭ kursaj periodoj kaj ripozo, ekskursoj, en majo, junio, septembro, oktobro. Skribu saman adreson.

— La 38a kongreso de SAT-amikaro okazos de la 2a ĝis la 4a de Aprilo en Saint-Brieuc (Francio). Skribi al : SAT-amikaro, 67, avenue Gambetta, 75020 Paris (Francio).

— Staĝoj en Internacia Feria Altlernejo (Gastejo Edmond-Privat) en La Chaux-de-Fonds. Petu la programon 1983 al Kultura Centro Esperantista, Postiers 27, Poŝtfako 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

— Internacia Esperanto pilgrimado en Lourdes (de la 5a ĝis la 12a de Aprilo). Aliĝoj al FKEA, BP 54, F-49150 Baugé.

— Feria Semajno de Turista Asocio « La Naturamikoj », en Maria Alm (Aŭstrio), de la 23a ĝis la 30a de Julio (antaŭkongreso). Adreso : M. Finkenzeller, Troststr. 27/10/2, A-1100 Vieno, Aŭstrio.

— Renkonto en Vieno (postkongreso), de la 6a ĝis la 13a de Aŭgusto. Aranĝo de « Monda Turismo ». Adreso : M. Finkenzeller, Troststr. 27/10/2, A-1100 Vieno Aŭstrio.

— Kongreso de Hispana Esperanto-Federacio, en Zaragoza, de la 21a ĝis la 25a de Julio. Adreso : Comité Organizador del 43 Congreso Nacional de Esperanto San Vincente de Plu, 1. Zaragoza 1, Hispanio (speciala aranĝo por la gejunuloj).

— Internaciaj Esperantaj Seminarioj-Ferioj de la 18a ĝis la 28a de Majo kaj de la 19a ĝis la 29a de Novembro 1983 en Velingrad (Bulgario) — Skibi al Manol ĉolev, 4600 Velingrad (Bulgario).

Dentista fako

Jen la adreso de la nova fako kiu grupigas la dentistojn : D-ro B. Szemök, Pozsonyi ut. 72, H-2737 Ceglédbercel (Hungario).

Novaj libroj

— « La naŭa kanalo », 13 originalaj noveloj, iuj sciencfikciaj, de Istvan Nemere, 104 paĝoj.

— « Sferoj », sciencfikciaj noveloj de naŭ verkistoj.

— « Facilaj dialogoj por lerni paroli en Esperanto » de A. Lienhardt. Dulingva eldono en franca lingvo kaj Esperanto. 780 simplaj frazoj (koresponda kasedo ekzistas).

— « Makedona antologio ». Diversaj tradukintoj. 154 paĝoj.

— « Matematikaj kaj statistikaj terminoj en Esperanto » (suplemento al « Plena ilustrita vortaro ») de Olav Reiersól.

— « Ĉu ni kunvenis vane ? ». Spionromano originale verkita de Johan Valano.

— « Pinokjo » de Collodi. Reeldono de la traduko.

— « Metodiko en la praktiko ». 17 aŭtoroj donas ideojn kaj iritajn vojojn en la instruado de Esperanto.

— « La litomŝla tombejo » de Karolo Piĉ : originala romano de bona aŭtoro. Diskutata kaj diskutenda verko pro la lingvaj « aŭdacaĵoj » !

— Reeldono de « Historio de la lingvo Esperanto » (1887-1927) de Edmond Privat, en unu volumo.

— « Lappar, la antikristo ». Originalaj noveloj de Endre Toth (15 rakontoj).

Diskoj

Konvenas atentigi niajn legantojn pri la nova disko (17cm, 33cpm) de Veselin Damjanov kaj Agathe Soemer-Pascali, kiuj kantas ariojn el « La geedziĝo de Figaro », « La magia fluto » kaj « La barbiro de Sevilo » laŭ profesia nivelo.

Ni memorigu la antaŭajn diskojn de Damjanov : « Veselin Damjanov kantas en Esperanto » (6 kantoj) kaj « Serenado al fraŭlino Loli ».

Kasedoj

Por cirkuligi kun profito en niaj grupoj, ni signalas la kasedojn eldonitajn de SAT-amikaro : « La nova situacio de Esperanto en la mondo » (prelego de Pierre Janton), « Pripensoj pri la kontraŭstaro al Esperanto » (prelego de Claude Piron), pri la malfacilajoj de la angla lingvo « Kial ne la angla ? » (prelego de John C. Wells), « Pour ou contre l'Esperanto à l'école » (Claude Piron).

ARTMETIOJ EN GRESILLON

Kiel legeblis en inta numero de « Kulturaj Kajeroj », okazos, venontsomere en Grésillon, staĝo titolita « **Artmetioj kaj Esperanto** ».

Artmetioj jam de longe havas sian lokon en Grésillon, tamen ĉifoje temas pri novaĵo — ja novaĵo — ĉar ĝis nun ili estis konceptataj kiel — pli malpli — agrablan paŭzon inter la « seriozaj » aferoj, nome la esperantaĵoj — dum ĉifoje, ili estos, se ne **LA** poluso, almenaŭ unu el la du polusoj de la koncernata staĝo.

Fakte la kompleta titolo devus esti : « **Artmetioj per Esperanto kaj Esperanto per Artmetioj** ».


Grésillon ja estas Kultur-domo kaj kulturo ne estas nur intelektaj aferoj. Nur per tio oni povus pravigi la starigon de staĝoj komplete centrigitaj ĉirkaŭ manlaboro.

Tamen, oni ne ignoru la realaĵojn, kaj facile konstateblas ke la plimulto el la ĉeestantoj en Grésillon alvenis celante ĉefe perfektiĝi en Esperanto. Laŭdinda celo, kiun ni ne celas kontraŭstari, male : ĉiu ja bone scias, ke restadante en fremda lando, eĉ sen ĉeesti kurson, oni multe pli rapide kaj efike lernas lingvon, ol ĉeestante laŭlonge de jaroj kursojn pri tiu fremda lingvo en sia lando mem.

Kompreneble, por Esperanto la situacio estas iel aparta : Esperantio restas grandparte mita lando, provizora okazaĵo, nepre gastigata de iu nacio kaj grandparte influata de ties lingvo. Tial, la kondiĉoj por ebligi « banadon » en Esperanto estas dekomence iel artefaritaj, despli ke, en Esperantio, oni havas ĝenerale nur « intelektajn » prizorgojn. La vorttrezoro de la esperantistoj estas tre riĉa je vortoj pri kongresaj aferoj, debatoj, opinioj, ktp..., sed eĉ spertuloj stumblas por traduki vortojn banalajn, « ĉiutagajn », kiel ekzemple « prise de courant » (ĉu ne vi ?).

Oni tro ofte forgesas ke lingvo ankaŭ — por ne diri ĉefe — efikas por **agi.** Kaj la plej fundamenta, baza ago estas la porviva ago, nome la produktado.

Kompreneble, en Grésillon, oni unue ferias, kaj estus maloportune starigi malferian etoson. Artmetioj taŭgas kiel kompromiso por ebligi banadon en iu Esperanto malsimila al tiu de la kongresoj, tamen en feriaj cirkonstancoj.



Tial en tiu staĝo, vi ne trovos kursojn. Aŭ, se ili estos, ili nur celos helpi aŭ prepari al la partopreno en la artmetiaj aktivaĵoj.

La staĝo disvolviĝos laŭ du aksoj :

— Lernado de iu el la teknikoj proponitaj (vidu sube) kaj realigo en la tekniko elektita.

— Informado pri la teknika aspekto de nia vivo, pere de vizitado en la regiono de metiistoj kaj/aŭ de fabrikoj ; pere de filmoj/lumbildoj, ktp... Ĉio, se inda, estos sekvata de debato (pri, ekzemple, la rolo de la tradiciaj artmetiistoj fronte al la moderna industrio, ktp...).

KVAR EBLECOJ


1 — **Fotoarto.** Tio jam de longe funkcias en Grésillon, ne estas utile longe prezenti tiun fakon...

2 — **Ŝtof-mozaiko.** Tiu tekniko konsistas el fabrikado de elteksaĵaj objektoj (kiel kusenoj, sakoj, murpaneloj, kovriloj, vestoj...) per kunigado de malgrandaj pecoj el diversaj ŝtof-pecoj. Historie, oni tion faris ŝpare, por ke ne alrubujiru la ŝtof-restaĵoj, por ilin utiligi. La rezultoj estis foje tiel plaĉaj, tiel ĉarmaj, ke pli kaj pli oni ne atendis havi restaĵojn por krei objektojn ŝtofmozaike. Nun, oni preskaŭ povas paroli pri memstara fako.

Estas proponita realigo de tabl-tuketaro, sed se prezentaĝas iuj jam spertaj en la fako, nenio malhelpas ke ili realigu pli malfacilan objekton.


Kvankam ne devige, konsilinde estas jam iom sperti en la uzado de steb-maŝino (cetere, la interesatoj kiuj alvenos aŭtomobile havos avantaĝon kunporti sian propran steb-maŝinon).

3 — **Karton-laborado.** Tiu tekniko konsistas el fabrikado de elkartonaj objektoj, ĉefe ujoj (kiel skatoloj, leter-ĉemizoj, fotingoj, skribilujoj, skribsubaĵoj, ktp...). La kartono, per si mem ne ĉiam belaspekta, estas kovrita per teksaĵo (tolo, ŝtofo,...) aŭ per papero, foje eĉ per ledo (tamen pro kosto kaj manko de taŭga ilaro en Grésillon, ni ne uzos ledon).



La realigo proponita estas la kuntirkesta skatolo (vidu la desegnon), kiu estas jam sufiĉe kompleksa objekto.

Male al la ŝtof-mozaiko, neniu sperto estas bezonata, tamen oni sciu ke tiu tekniko postulas precizemon...



4 — **Ceramiko.** Tiu tekniko konsistas el fabrikado de plej diversaj objektoj el argilo (ujoj manĝilaraj : tasoj, teleroj supujoj... ; potoj, statuoj ; sed ankaŭ industrie : brikoj, tegoloj, kaheloj, lavujoj, bankuvoj, ktp...). Ĉar tre laŭmodaj, la teknikoj uzitaj de la « Potisto » estas ĝenerale konataj. Almenaŭ, oni scias pri kio temas (permana modlado, tornado). Fakte, tiuj teknikoj estas tre malfacilaj kaj postulas longan trejnadon antaŭ ol atingi akcepteblajn rezultojn. Ekzistas multaj aliaj teknikoj, pli simplaj, por prilabori argilon. Kelkajn el ili ni utiligos.

La proponita objekto realigota estas ŝak-ludilo (figuraro kaj tabulo, ĉio el ceramiko), sed, kompreneble, multaj aliaj objektoj estas proponeblaj de la interesatoj.

Kvankam oni teorie povas labori ceremonie vestita, estas konsilinde kunporti antaŭ-tukon, kitelon, aŭ ion similan...

Teknike gvidos la fakojn profesiaj instruistoj, teame kunligitaj kun spertuloj pri la lingvo : Tiu metodo devus garantii la seriozecon kaj efikon de la aranĝo

Noto 1 : Pro la fakto ke en Aŭgusto multaj magazenoj ferias, ni konsilas (por ŝtof-mozaiko kaj karton-laborado) kunporti ŝtofon. Vi preskaŭ nenion trovos surloke. Elektu kotonaĵojn ne tro dikajn, kompreneble belaspektajn, kaj, por ŝtof-mozaiko, diversajn pecojn kiuj taŭge, kongrue, povas najbariĝi (laŭ koloro kaj dikeco).

Noto 2 : Se la proponita staĝo allogas vin, sed tamen neniu el la 4 teknikoj interesas vin, skribu al ni por indiki kiun teknikon vi ŝatus trovi. Eventuale, laŭ la eblecoj, ni povos starigi kvinan aŭ anstataŭigi unu el la proponitaj.

Serge Sire
16, Chemin de l'Abbaye
F-74000 Annecy-le-Vieux

PAĜO DE LA GEKNABOJ

koalo



Jen aŭstralia besto, la koalo. Ĝia densa, laneca felo estas griza sur ĝia dorso kaj flav-blanka sur ĝiaj brusto kaj ventro. Ĝi estas kvieta, karesinda besteto — sed, ne turmentu ĝin ! Se vi timigas aŭ kolerigas ĝin, atentu ! ĝi havas fortajn ungegojn. kaj povas vin akre grati.

La koalo loĝas alte en eŭkaliptaj arboj. Ĝi manĝas nur foliojn de eŭkaliptaj arboj kaj malofte trinkas. Ĝia nomo, koalo, havas la signifon : neniu trinkaĵo.


La koala bebo naskiĝas tre eta, kaj devas vivi dum ses monatoj en la ventra haŭt-poŝo de la patrino.

Kiam ĝi eliras el la poŝo, ĝi estas ĉirkaŭ 17 centimetrojn longa. Ĝis ĝi havas unu jaron ĝi rajdas ĉien sur la dorso de la patrino.


Jean Lehane, Toowoomba, Aŭstralio.

David kaj Marina Lloancy, (Francio), verkis rakonton pri la aventuroj de verda vermo. Ili faris ankaŭ desegnojn. La tuton ili kunmetis por fari bild-libron.


Se vi kopios la bildojn kaj la rakonton sur paper-foliojn aŭ kartonon, ankaŭ vi povas fari el ili bild-libron.




En la nokto iu malgranda ovo estas sur iu folieto.




La malgranda ovo estas falinta.
Ĝi falis sur la teron, kaj la malgranda vermo rampas sur la teron.




Jam du tagojn la malgranda vermo ne manĝis ion.
Ĝi volas manĝi, sed ne povas manĝi.




Ĝi trovis unu pomon, kaj ĝi manĝis ĝin.
Ĝi estas tre bongusta.




Ĝi trovis du pirojn, kaj ĝi manĝis la du pirojn. Ankaŭ ili estis tre bongustaj.



Ĝi manĝis tri prunojn. Ĝi ankoraŭ volas manĝi.



Ĝi trovis kvar fragojn. Ili estis bonaj.



Kaj finfine, kvin oranĝojn.
Ĝia ventro estas dika.

Vi povas ankaŭ kolorigi la bildojn. La folioj kaj la vermo verdaj ; la luno kaj la ovo estas blankaj ; la arbo kaj la tero estas brunaj ; la suno kaj la piroj estas flavaj ; la pomo kaj la fragoj estas ruĝaj ; la prunoj estas ruĝe bluaj ; la ĉielo estas blua kaj la oranĝoj estas oranĝ-koloraj !

Pri la mito de Kasandra



Por klarigi la temon, mi memorigos la grekan miton. Kasandra, filino de Priamo, ricevis de Apolono la kapablon antaŭvidi la eventojn. Sed, ĉar la junulino rifuzis amori kun la dio, tiu ĉi decidis, *ke* neniam la homoj kredos la Kasandrajn anoncojn. Kaj fakte, Kasandra anoncis, ke la fama ĉevalo lasata de la grekoj estis danĝera, sed la Trojanoj ne kredis, kondukis la ĉevalon internen de la remparoj, kaj tiam el la ĉevalo eliris grekaj soldatoj, kiuj provokis la pereon de Trojo. Poste, Kasandra, militkaptita kaj donacita al Agamemnono, anoncis al tiu ĉi, ke li ne devus reveni al la hejmo, kiu estas por li danĝera. Kompreneble, Agamenono tion ne kredis, kaj li estis hejme murdita de Klitemnestra (kaj Kasandra mortis same).

Kompreneble, laŭ la mito, temas pri amora afero inter dio kaj mortontino, sed ĉu oni ne povas ankaŭ trovi en tiu mito alia signifo, nome, ke la homoj rifuzas kredi tion, kio malplaĉas al ili ?

La nuna stato de la mito

Post jarcentoj, la homoj pli malpli forgesis la grekan originan rakonton pri Kasandra, sed ofte aludas, en tekstoj, libroj kaj publikaj debatoj, pri novaj « kasandraj », kiuj povas esti eĉ « viraj », kaj tiam ne plu povas temi pri amora afero kun Apolono. Tiajn homojn mi nomos kasandruloj, kaj mi difinos ilin laŭ la ĉiama valoro de la mito.

Okazas ke homoj antaŭvidas malagrablajn okazaĵojn por unu potenculo aŭ por unu popolo. Se ili klare kaj publike anoncas tion, oni ne kredas ilin, kaj eĉ foje ilin kondamnas pro atenco kontraŭ la majesto de suvereno, aŭ perfido al la popolo. Sed kio gravas por mi, en mia nuna studo, tio estas la nekredemo. Kaj estas interese serĉi, unue kial ekzistas kasandruloj, kiuj antaŭvidas katastrofojn, kaj kial la popoloj ĉiam rifuzas kredi ilin.

Kial estas kasandruloj ?

La unua problemo estas tiu de la fontoj de antaŭvido. Dum la jarcentoj, la homoj kiuj antaŭvidis pravigis siajn asertojn per du malsamaj apogoj : la voĉo de Dio, la instruo de la scienco. Notindas, ke iuj homoj provis miksi la fontojn, ĉu dirante, ke la scienco estas revelacio de Dio (tio estas la sintenado de okultistoj, inter kiuj oni povas meti Komenion, pri kiu mi jam parolis), ĉu asertante, ke la scienco estas ĉiopova, kaj tiel diigi tiun sciencon.

Dum la jarcentoj, multaj estis la profetoj, kiuj anoncis, ke ili parolas je la nomo de Dio. La granda plimulto el ili anoncis eventojn, kiuj ne okazis, ekzemple la finon de la mondo, mil jarojn post Kristo. Kelkaj el tiuj homoj ŝajnas tute strangaj, uzas kvazaŭ teatrajn prezentaĵojn por pli impresi la popolon... sed tiaj kromaĵoj ne plivalorigas la antaŭdiron. Ekzemple, mi aŭdis profetaĵon en Parizo, kiu anoncis nuklean militon antaŭ 1963, kaj revenon sur la tronon de Britio de la eks-reĝo Eduardo la 8-a. Tiuj du profetaĵoj ne plenumiĝis.

Fakte, kiam la anonco aperas kiel revelacio intua, estas neeble scii, ĉu la homo parolas laŭ inspiro de iu diaĵo, aŭ spirito, aŭ ĉu li tute simple esprimas individuan konvinkon. Kiam la anonco estas malagrabla, oni komprenas la tendencon al nekredemo.

Sed en aliaj kazoj, la homoj prezentas la antaŭvidon ne kiel transnaturan intuon, sed kiel prognozon, kiu konkludas sciencan analizon de la nunaj eventoj. La granda diferenco inter la moderna scienco kaj la diaj revelacioj kaj okultaj sciencoj, estas la kongruo inter diversaj eksperimentoj. La moderna scienco konstruas hipotezojn, kaj kredas pri ili nur kiam ili estas kontrolitaj de ĉiuj sciencistoj pere de publikaj eksperimentoj, kiujn oni povas okazigi tiel ofte kiel oni deziras. Do principe, pro tiu karaktero publika de la sciencoj, oni ĉiam devus kredi pri la sciencaj prognozoj, kaj tiam ne plu estus kasandruloj.

Sed bedaŭrinde, la afero estas pli komplika. Se teorie la prognozoj estas sciencaj, en la praktiko eĉ moderna scienco scias malmulte, kaj la praktikaj asertoj estas miksaĵoj de prognozoj sciencaj kaj de individuaj intuaj kredoj. Krom pri kelkaj raraj esceptoj, oni plej ofte rajtas dubi pri la anoncitaj eventoj.

Sed necesas aliflanke analizi la sintenon de la aŭskultantoj. Kelkfoje, individuoj juĝas laŭ raciaj kriterioj, sed plejofte ekzistas en la popoloj iu psika interkonsento, iu komuna kredo religia, politika aŭ alia. Tiu komuna kredo povas naskiĝi en sistema instruado, pere de devigaj lernejoj aŭ per poramasaj informrimedoj... ne parolante pri diktaturo, karceroj, torturoj kaj aliaj konvikiloj.

Konklude de nia studo, oni povas diri, ke la kasandruloj manifestiĝas, kiam homoj ne aldonas al siaj argumentoj la psikajn kredojn de la plimulto de la popolo. Inverse, kiam homoj sukcesas trovi la vortojn, kiuj plaĉas al la popolo, ili sukcesas okazigi kredon. Unu taŭga ekzemplo

estas la interveno de generalo Degol (De Gaulle) en la alĝeria konflikto. Li sukcesis akceptigi la finon de koloniado, kredigante la popolon, ke li « komprenis » (la popolo aŭdis « apogos ») la francojn loĝantajn en Alĝerio. Tia ekzemplo de lerta kaŝo por la malagrabla vero, fine pravigas la ĝeneralan regulon pri la kasandruloj : ĝenerale la homoj kaj popoloj rifuzas kredi malagrablajn antaŭvidojn.

Kial la popoloj ŝajnas blindaj ?

Mi jam citis la rimedojn kutime uzatajn por vole nevole konduki la homojn al strikta konformismo. Iam temas pri libera decido de aŭtoritatuloj, kiuj respondecas pri aliaj homoj, kaj speciale pri infanoj. Ekzemple, la homoj kiuj fondis la respublikan lernejon de Francio, ĉirkaŭ 1880, opiniis, ke por ne plu ricevi malvenkon en milito, kiel tio okazis en 1870, necesas instrui patriotismon al la lernantoj de la deviga lernejo. Kaj eksplicite la programoj de tiu epoko klarigas, ke pere de historio, geografio, moralo kaj zorge elektitaj tekstoj por legado, oni konstruos en la tiamaj infanoj firman patriotismon... por prepari la rekonkeron de Alzaco. Kompreneble, la situacio estas tute simila por la diversaj religioj. Ni legis en la verko de Komenio, kiel li intencas grave puni tiujn, kiuj rifuzos la « lumon de Dio ». Al tiuj sistemaj influoj, oni devas aldoni la kvazaŭ biologia tendenco de la homo imiti siajn kunulojn. Nun en nia industria mondo, kie ĉiuj objektoj serie fabrikitaj estas similaj, kie en la sama momento milionoj da homoj aŭskultas la samajn informojn, preskaŭ ĉio instigas la homon vivi konforme al sia ĉirkaŭaĵo. Tion mi nomos konformismo.

Sed inter la homoj, iuj, pro personaj spertoj scias, ke ie kaj iam oni mensogas. Pro psika tendenco al ĝeneraliĝo, ili konkludas, ke ĉio estas mensogo, ke la « aliaj » persekutas ilin, kaj pli malpli fariĝas malamikoj de la « socio ». Rilate al la kredoj, ili sisteme neas kaj kontraŭdiras ĉion, kio venas de la institucioj. Mi nomos ilin kontraŭkonformistoj, substrekante la fakton, ke ankaŭ ili estas sklavoj en sistema kontraŭdiro, de la tradiciaj « veroj ».

La problemo por mi estas : ĉu povas ekzisti homoj aŭtonomaj, kiuj kapablas juĝi laŭ personaj kriterioj aŭ spertoj, kaj ne nur « por » aŭ « kontraŭ » la diversaj oficialaj kredoj ? Tiu aŭtonomeco estas la oficiala celo de ĉiuj edukaj sistemoj. Eĉ Komenio diras, ke kiam la homo estos vidinta la « lumon de Dio », ĝi estos tute libera konduti per si mem, ĉar la aŭtoro fidas pri la forto de tiu lumo, kiu konformigas la homon al sia (dia) vero. Multaj tiaj homoj asertas, ke ili estas favoraj al la libera juĝo fare de la homoj, sed kondiĉe, ke antaŭe, tiuj homoj ricevos « formadon », kiu protektos ilin kontraŭ la diversaj « eraroj » (tio estas la « veroj » de la aliaj). Ankaŭ estas homoj, kiuj ne havas precizajn kredojn, ili nur neas la aliajn. Tiam la liberigo de homo (ne liberiĝo) okazos kiam la tiel nomataj liberigantoj estos venkintaj super ĉiuj aliaj kredantoj. Kurioze, la sinteno de Komenio tre similas al citaĵoj de l'Korano ; la nova religio alportas pacon al la tero, harmonion inter ĉiuj homoj, nur la malamikojn de Dio oni devas kontraŭbati, je la nomo de libereco por la nova kredo ; sed la historio montras, ke tiu ago estas milito kaj amasa buĉado por la « malfideluloj ». Eĉ kiam la piaj homoj ne ricevis la politikan povon, eĉ kiam ne estas amasaj mortigoj, tia instruo ne povas liberigi la homon. Oni dresas la novan homon kontraŭ la malnovan veron, oni liberigas la homon nur rilate al tiu speciala kredo, tio estas, parta se ne partieca, liberigo.

Kiel la dogmoj ne permesas aŭtonomeco ?

La dogmoj povas ricevi diversajn aspektojn. Unue, mi citos tiujn, kiuj ŝajnigas sin sciencaj. Kelkfoje temas pri historia teorio ; la klasbatalo, en aliaj kazoj oni miksas iujn aspektojn de la scienco kun socia kredo, kaj mi pensas pri la pseŭdo-rasismo de Hitlero, same kiel pri la biologiaj tezoj de Lisenko en 1948. Iuj religiaj movadoj provas aspekti sciencaj : ekzistas « kristana scienco » apud multaj sektoj, kiuj uzas elektrajn aparatojn en sia propagando. Oni eĉ povas aldoni al tiu kategorio, ĉiujn okultajn sciencojn inkluzive de la kredoj de Komenio. En tiu kazo oni provas kredigi al la individua homo, ke la proklamita « vero » estas « leĝo de la naturo », kaj kion individua homo povas kontraŭ la misteraj fortoj de la naturo ? Nur obei ĝi povas.

En aliaj kazoj, la « vero » estas revelacio de iu dio. La plej gravaj nunaj religioj baziĝas sur iu libro, kie oni ripetas la dirojn de la dio. Kompreneble, ĉar estas diversaj libroj, kaj diversaj dioj, tiu multeco kondukas al skeptikismo. Sed en la diversaj lokoj, la pastroj de ĉiu el ia religioj instruas, ke la vera dio estas « ilia », kaj, ke la « vera vero » kuŝas en la libro, kiun ili prezentas. Tiel longe kiel la popoloj vivis sufiĉe malproksime unuj de la aliaj, la multeco de sanktaj libroj ne estis ĝena. Mi rimarkis, ke kiam Komenio parolas pri la diversaj religioj, kiuj devas unuiĝi, li tute ne aludas al la orientaj religioj. Por la tiamaj kristanoj, la vero estis en la biblio, la judoj estis dio-mortigistoj (ĝis la koncilio de 1963), kaj la islamanoj la malfideluloj, kiuj devojiĝis. Sed post la malkovro, en la 19-a jarcento de multegaj religioj, kredoj plej diversaj en la kvin kontinentoj, oni povas sin demandi, kiel la homoj povas kredi, ke ĉiuj libroj estas falsaj krom tiu, kiun ili uzas ? Al tiu demando, mi povas alporti du respondojn. Unue, kiam la religiuloj havas politikan povon, ili malpermesas la nekonformajn librojn. Ekzemple, dum la milito, la registaro kiu estris Francion el « Vichy » malpermesis, en la laborejoj por la junularo iun libreton : « Historio de la religioj ». La letero, kiu konigis tiun malpermeson tekstis : « Tiu libro ne distingas la veran religion de la aliaj ». (Tio ne estas mezepoka rakonto, ĝi okazis en Francio en 1943). La alia respondo estas tiu de Kartezio, kiu ne povante racie elekti inter katolikismo kaj protestantismo, akceptis la religion en kiu li naskiĝis. Do ĉŭ pro timo, ĉu kutimo la homoj tendencas konformiĝi al la ĉirkaŭanta opinio.

Sed la plej danĝeraj dogmoj estas nek la « sciencaj », nek la « religiaj », kiuj estas eks-

plicite anoncitaj, ili estas la kaŝitaj dogmoj. Mi citos kelkajn ekzemplojn por montri kiel funkcias tiam la penso de la homo. Pri la libera komerco, la plej granda parto de la homaro kredas « naturaj » la leĝojn de la merkato, kiel ekzemple tiu de la oferto kaj de la peto. De jarmiloj, la homoj alkutimiĝis al la fakto, ke kiam varo estas abunda, oni pagas ĝin malmultekoste, kaj inverse, kiam ĝi estas rara, ĝi « akiras valoron ». Mi neniam vidis homojn ribeli kontraŭ tio, krom en la « abundeca teorio » tre malmulte disvastigita, kaj kiu utopias pri aliaj temoj. Sed, tamen, kiam oni pripensas pri tiu fama leĝo de la merkato, oni konstatas, ke la plej riĉaj profitas la sistemon por pliriĉiĝi dum la malriĉaj pli malriĉiĝas. Tion oni nun konstatas inter la jam industrigitaj landoj (riĉaj) kaj la aliaj kiuj pli kaj pli malriĉiĝas. Tamen, eĉ la politikistoj, kiuj, laŭdire, deziras helpi al la « tria mondo » diras samtempe, ke ili deziras respekti la leĝojn de la « libera merkato », ĉu neniu infano povas krii, ke la reĝo estas nuda ?

Mi jam havis la okazon, parolante pri la « homaj rajtoj », aludi pri la ekonomiaj rajtoj. Oni ekzemple povas legi en la tutmonda deklaracio, ke ĉiu homo rajtas labori... kaj nun en Eŭropo estas milionoj da senlaboruloj. Oni same povus aserti, ke ĉiu homo rajtas manĝi... sed kion fari, kiam ne estas manĝaĵo ? Povas okazi natura katastrofo aŭ nuklea milito, kiu estas la valoro de tiu dogmo ? Kaj kion diri pri la rajto al feliĉo ! ! ! Sed, en la homamasoj oni ripetas tiujn sensencaĵoj kaj vekas entuziasmon de la ŝafaro, kiu neniam pripensis.

Oni povus diri same pri demokratio. Kiam oni ne scias, kiu estas la bona solvo, oni voĉdonigas la popolon. Kaj poste, oni decidas ke la plimulto nepre pravas. Kiu kuraĝis balotigi la popolon por antaŭvidi la veteron aŭ la venkonton en sporta konkurso ? Pri la ĉevalkurado, ĉiuj scias, ke se iuj povas gajni multe, ili ŝuldas tion al la *eraro de la plimulto*. Tamen, kiam temas pri elektoj pri energio, oni dekretas, ke la plimulto pravas, ĉar tio estas demokratio. Unu bazo de la demokratio estas la « ĝenerala profito » (Komenio parolas pri « ĝenerala Bono ») kaj Ruso' aludis pri socia kontrakto... sed tio estas nur paroloj. En la realo, kion oni vidas ? La homoj, kiuj havas samajn interesojn por samaj profitoj grupiĝas en asocioj inter kiuj estas la sindikatoj, la asocioj de komercistoj, industriaj mastroj... k.t.p. Poste tiuj grupoj batalas unu kontraŭ la aliaj ; kiuj pensas pri la ĝenerala profito ? Neniu, neniam. La estroj de la asocioj ricevis mandaton defendi la interesojn de la grupanoj, sed tute ne la ĝeneralan bonon, eĉ se ili dezirus tiun ĝeneralan profiton, ili ne povas tion fari, ĉar ili estus taksataj perfiduloj rilate al sia asocio. La funkciado de demokratio estas teknike ne ebla... sed oni daŭre parolas bombaste pri tiu fantomo.

Inter la konsekvencoj de tiu mito pri demokratio estas la dogma kredo pri egaleco inter la kapabloj de la homoj. Komenio diris, ke la homoj estis ĉiuj « bildo de Dio », nun oni diras, ĉar la plimulto ĉiam pravas (laŭ la citita teorio), ke ĉiuj homoj kapablas kompetenti pri ĉiuj sociaj, ekonomiaj aŭ teknikaj problemoj... la homoj estas senlime kapablaj pri ĉio (t.e. « bildo de Dio »), kaj kiel diris Komenio, oni povas instrui ĉion al ĉiuj. Dum 40 jaroj, mi renkontis multajn instruistojn ; kelkaj rezonis kiel mi jam diris : « la homoj estas civitanoj, *do* ili estas kapablaj », sed la plimulto individue diris la malon. Sed ĉiufoje kiam ili kunvenis, en amaso, la dogmo renaskiĝis : « ĉiuj homoj estas egale kapablaj ».

Kial estas dogmoj ?

Unue necesas ripeti, ke la homo bezonas metafizikon, tio estas la kialo de sia propra vivo kaj la celo de tiu vivo... ktp. Eĉ kvarjara infano demandas la gepatrojn pri tiaj problemoj. Sed al tiuj demandoj, ne estas unuanimaj respondoj. La objektiva scienco ne povas respondi, tial eĉ nun, la homo estas en la situacio de la prahomo, kiu provis, per mitoj, klarigi la homan situacion.

Oni ne povas ne rimarki, ke la evoluo de la metafizikaj respondoj inter la socioj similas al tiu de la maturiĝanta infano. Unue, oni provas ĉion klarigi per rilato al si mem, poste al la homoj ĝenerale. Tiu komparo ekzistas ankoraŭ ĉe Komenio, kiu pere de la teorio pri mikrokosmo, klarigas la mondon per la homa korpo kaj reciproke. Oni tute nature tendencas kredi, ke en la naturo ĉio similas al la unue konata medio, tio estas familio, kaj kompreneble, al tiu mondo kiu bezonas patron, oni donas dion, kiun oni nomos : « Nia Patro ». Per tiu metodo naskiĝas la religiaj dogmoj, pli malpli ligitaj kun la historio de tiu aŭ alia popolo. Por Komenio, la vera dio estas tiu, kiu batalis kun la hebreoj, kaj en la projektoj de Komenio, nur la kristanoj povas instrui la ceteron de la mondo.

Sed okazas, ke en la socioj, la tradiciaj religioj perdas iom-post-iom sian influon. Tiam la homoj provas trovi aliajn klarigojn por la mondo, pere de « sciencoj ». La scienco povas esti donita de Dio, kiam temas pri okulta scienco, rezervita al morala elito, kaj kiun oni ne devas liveri al malnobluloj. En la antikva epoko, tiaj sciencoj ekzistis en Egiptio, Grekio (Pitagoro) kaj ili pli malpli miksiĝas en la orientaj religioj. Sed la plej modernaj homoj trovis alian solvon ; ili malkovris, pere de la eksperimenta metodo, sciencon, kiu ne estas donita de Dio, sed fabrikita de la homo mem. Tial, ekde la 17-a jarcento en Eŭropo, paralele kun la elvolviĝo de la scienco kaj la teknika potenco, la homo tute simple sin nomis Dio. Ĉiuj doktrinoj, kie la homo estas centro de la universo, kaj kie Dio restas nur senpova figuro, estas fakte religioj, kies dio estas Homo. Iam tiu dio estas la tuta homaro, kaj oni parolas pri « humanismo », alifoje, la dio estas nur parto de la homaro, ĉu iu speciala raso (la blankismo de la kolonia periodo) (aŭ la teorioj de la nazioj), ĉu iu klaso, ekzemple la klaso de la laboristoj, kredo kiu estas komuna al la diversaj skoloj de Marksismo.

Resume, por vivi, la homo ne nur bezonas nutraĵon, ĝi bezonas kialojn. Por trovi tiujn kia-

lojn, ĝi inventis, kaj daŭre inventas teoriojn pli malpli religiajn kiuj estas tiel necesaj por ĝi, kiel estas la nutraĵoj. Tial oni komprenas, ke la homoj akceptas morti pro la dogmoj, kaj por atingi idealon, kiu fontas ankaŭ el tiuj dogmoj.

Kial oni persekutas la kasandrulojn ?

La respondo estas facila se oni sekvas miajn difinojn. La kasandruloj anoncas eventojn, kiuj ne kongruas kun la dogmoj, ili vole nevole aperas kiel herezuloj. Por la homoj, kiuj bezonas kredi al la dogmoj, la kasandruloj detruas iliajn vivcelojn... logike, por pluvivigi la dogmojn, oni devas mortigi la kasandrulojn.

Dum la historia daŭro, ofte la kasandruloj estis favoraj al nova dogmo, kontraŭ la malnova ; ili estis proprasence herezuloj, kaj ilia kasandra rolo estis nei la malnovdogmajn antaŭvidojn. Kiam la nova dogmo gajnas, tiuj herezuloj fariĝas dioj, same kiel la politikaj kaptitoj fariĝas ministroj post revolucio. Tuj oni rekonos en tiuj homoj la tiel nomataj profetoj de la venkinta religio ; profetoj, ĉar ili anoncis estontan eventon. Sed kiam ili profetis, ĉu oni kredis ilin ? Laŭ tradicio neniu sukcese profetas en sia lando. Kial ? Tutsimple, ĉar profeto parolas kontraŭ la lokaj dogmoj kaj povas esti kredata, nur en landoj, kie la dogmoj estas malsamaj.

Konkludo

Mi montris, ke la homoj rifuzas la veron, kiam ĝi kontraŭas la lokajn dogmojn. Mi diris, ke, kun la evoluo de la socio, la dogmoj ŝanĝiĝis. Mi esperas, sed tio estas tute ne pruvebla kredo, ke iam la homoj sukcesos pravigi sian vivon per kredo ne blindiganta, kredo, kiu akceptos la dirojn, kiuj neas la nunan staton de la kredo. Tio fakte estas la sintenado de la scienculoj, kaj oni povas revi pri iu tempo kiam, same kiel nun la fizikaj teorioj estas ŝanĝeblaj sen milito, tiam la metafizikaj teorioj ricevos saman flekseblecon.

F. BOYET.

LA PROFETO (eltiraĵoj)



« ... la blankaj flugiloj de la morto ... »

Profunda estas via sopirado al la lando de viaj rememoroj kaj al la hejmoloko de viaj altaj deziroj.

Kiam la amo signas al vi sekvu ĝin, kvankam malglataj kaj krutaj estas ĝiaj vojoj ; kaj kiam ĝiaj flugiloj envolvas vin, cedu al ĝi, kvankam la glavo en ĝia plumaro kaŝita povas vundi vin. Kaj kiam ĝi alparolas vin kredu je ĝi, kvankam ĝia voĉo povas disrompi viajn revojn, samkiel la norda vento fuŝas viajn ĝardenojn. Ĉar samkiel la amo vin kronas ĝi devas vin krucumi ; samkiel ĝi estas por via kreskado, ĝi estas por via pritondado ; samkiel ĝi sin levas je via alto kaj karesas viajn plej etajn branĉojn subsune tremantajn same ĝi eniĝos ĝis viaj radikoj ŝtelŝoviĝos ĝis ilia engrunda kungluiĝo. Kiel grenajn garbojn ĝi forportas vin ; ĝi draŝas vin por vin nudigi ; ĝi kribras vin por forliberigi vin de via branĉo ; ĝi pistas vin ĝisblanke ; ĝi knedas vin ĝis flekseblecо kaj tiam ĝi liveras vin al sia fajro, por ke vi povu fariĝi la sanktega pano por la diaj festenoj. Ĉion ĉi tion la amo plenumados por vi, por ke vi povu ekkoni la sekretojn en viaj koroj kuŝantajn kaj plenkonscie iĝi ero el la koro de la vivo. Sed se timpremite vi nur sopiras al paco de l'amo kaj al plezuro de l'amo prefere vestu vian nudecon kaj iru for de la amdraŝejo. Por atingi la sensezonan mondon vi ridos, sed ne vian tutan ridpro-

vizon, kaj vi ploros, sed ne vian tutan plorprovizon. Nur el si mem la amo disdonas kaj el si mem ĝi forprenas. Nek posedas la amo, nek esti posedata ĝi volas, ĉar al la amo sufiĉas la amo. Kiam vi amas, ne diru : « Dio kuŝas ĉe mia koro » sed prefere : « Mi kuŝas ĉe la koro de Dio ». Kaj ne kredu, ke la iradon de la amo povas gvidi vi, ĉar la amo, se ĝi taksos vin inda, vian iradon gvidos. Nenian ajn deziron havas la amo krom plenumiĝadon ; kaj se vi amas kaj devas havi dezirojn ili estu tiaj : fandiĝi kaj esti fluanta rojo, kiu sian melodion kantas al la nokto ; sperti la doloron pro troa tenereco ; esti vundata de sia persona amkompreno kaj sangadi volonte kaj ĝoje ; vekiĝi ĉe matenruĝo kun flugilhava koro, dankodiri por nova amtago ; ripozi je la tagmeza horo kaj meditadi super la amekstazo ; rehejmiĝi ĉe sunsubiro kun dankemo kaj tiam ekdormi kun enkora preĝo al la plejamato kaj surlipa laŭdokanto.

(pri geedzeco).

Kunaj vi naskiĝis kaj kunaj vi starados por ĉiam. Kunaj vi starados kiam la blankaj flugiloj de la morto disigos viajn tagojn. Jes, kunaj vi estados ĝis en la silenta memoro de Dio. Sed estu interspacoj en via kunestado kaj la ĉielaj ventoj dancu inter vi. Amu unu alian sed per la amo ne starigu baron. Prefere ĝi estu ondiĝanta maro inter la bordoj de viaj animoj. Ĉiu plenigu la pokalon por la alia sed ne trinku el unu pokalo. Kundividu vian panon sed ne manĝu el la sama panbulo. Kantu kaj dancu kunaj kaj estu ĝojaj sed ĉiu restu sola, samkiel la liutaj kordoj solas dum ili kunvibradas samharmonie. Donu viajn korojn negardante ilin reciproke tial, ke nur la mano de la vivo povas enteni viajn korojn kaj staradu kunaj, kvankam ne tro apudaj, ĉar la templaj pilieroj rektiĝas disaj kaj la kverko kaj cipreso ne kreskas subombre unu de la alia.

(pri la idaro).

Viaj naskitoj ne estas viaj idoj. Ili estas la gefiloj de la viva vokiĝo. Tra vi ili venas sed ne el vi kaj kvankam ili estadas kun vi ili ne apartenas al vi. Al ili vi povas donadi vian amon sed viajn pensojn ne, ĉar siajn proprajn pensojn ili havas. Akcepti iliajn korpojn vi povas, sed iliajn animojn ne, ĉar iliaj animoj loĝas en la domo de morgaŭ, kiun vi ne povas viziti eĉ en-sonĝe. Kaj vi povas klopodi esti al ili similaj, sed ne penadu fari ilin tiaj, kiaj estas vi, ĉar la vivo nek retroiras, nek malfruiĝas kune kun la hieraŭo. Vi estas la pafarkoj, per kiuj, kiel vivaj sagoj, viaj naskitoj estas celpafataj. La pafisto vidas la celon survoje al la senfino kaj li streĉegas vin tutpotence, por ke liaj sagoj povu forflugi rapide kaj malproksimen. Via streĉiĝo pere de la pafarkista mano celu la ĝojon ĉar, samkiel li amas la flugantan sagon, same li amas la firman pafarkon.

(pri donado).

Nur malmulte vi donas, kiam vi donas el viaj havaĵoj. Kiam el vi mem vi donadas, tiam plenreale vi donas. Ĉar kio estas viaj havaĵoj, kiujn vi avareme domaĝas timante ilin bezoni morgaŭ ? Kaj pri morgaŭ ? Kion alportos morgaŭ al la tro singardema hundo ostojn ŝtelŝovanta en labilan sablaĵon dum ĝi postsekvas la pilgrimanton survoje al la sankta urbo ? Kaj kio estas la timo pri mizero, krom la mizero mem ? Kaj la timo pri soifo apud via plenplena puto, ĉu ĝi ne estas jam nehaltigebla soifo ?

Kelkiuj donas malmulton el sia multhavaĵo kaj ili donas por naski dankemon kaj ilia kaŝa deziro putrigas ilian donon. Kelkiuj havas malmulton kaj la tuton fordonas. Ĉi lastaj kredas je la vivo kaj ties boneco kaj ilia kesto neniam estas malplena. Kelkiuj donas kun ĝojo kaj tiu ĉi ĝojo estas ilia rekompenco. Kelkiuj donas kun doloro kaj tiu ĉi doloro estas ilia bapto. Kelkiuj donas spertante nek ĝojon nek doloron kaj ne prikonscias sian virton. Ili donadas, samkiel en la valo tie fore la mirto eligas sian parfumon traspacen. Per la manoj de tiaj estaĵoj Dio parolas kaj pere de iliaj rigardoj Li ridetas al la terglobo.

Estas bone, ke oni donu petite, sed estas pli bone, ke oni donu nepetite, pro kompreno. Kaj por la favorkoruloj traserĉadi tiujn kiuj estas ricevontaj estas ĝojo pli granda, ol donadi. Ĉu estas io, kion vi intencus rifuzi ? Ĉio, kion vi havas estas iam fordonota. Donadu do nuntempe, por ke la donsezono estu via, sed ne tiu de viaj heredontoj.

Vi kutimas diri : « Mi donos, sed nur al tiuj, kiuj tion meritos ». Ne tiel la arboj parolas en viaj hortoj kaj la gregoj sur viaj paŝtejoj. Ili donadas por vivi ĉar gardoteni estas perei. Plejcerte kiu indas ricevi siajn tagojn kaj noktojn,

tiu indas ĉion ricevi de vi ; kaj kiu meritis trinki el la vivoceano, tiu meritas plenigi sian pokalon el via rojeto. Krome ĉu estas merito pli granda, ol tiu el kuraĝo kaj konfido konsistanta ? Jes : tio estas la favorkoremo ricevi. Kaj kiaj estas vi, por ke la homoj ŝiru al si la brusto kaj senvestiĝu el sia fiero tiel, ke vi povu vidi ilian dignon nudigita kaj ilian fieron elmontrita ? Porkomence strebmeritu mem esti donantoj kaj doniloj. Ĉar ververe al la vivo donas la vivo kaj vi, kiuj imagas al vi esti donantoj estas efektive nur atestantoj. Kaj vi kiuj ricevas -kaj ĉiuj vi ricevas- surŝultrigu nenian ajn dankoŝarĝon timante altrudi jungilon al vi mem kaj al la fordoninto. Prefere leviĝu kune tiu, kiu fordonas, akceptante liajn donojn kvazaŭ ili estus flugiloj, ĉar tro zorgi pri via ŝuldo estas pridubi lian fordonemon, kies grandanima patrino estas la tero kaj patro estas Dio.

Via ĝojo estas via nemaskita malĝojo kaj la sama puto, el kie via rido ekŝprucas ofte estis plenigita de viaj larmoj. Kaj kiel povus esti alie ? Ju pli profunden la ĉagrenoj elfosas vian eston, des pli da ĝojo vi kapablos enteni. Pri la pokalo, kiu entenas vian vivon ĉu ĝi ne estas la sama, kiu estis bakita en la potista forno ? Kaj pri la liuto, kiu karesas vian animon, ĉu ĝi ne estas la sama lignopeco, kiun la tranĉilo elkavigis ?

Kiam vi estas ĝojaj enrigardu profunden en vian koron kaj vi konstatos, ke kio alportas al vi ĝojon ne estas alia, ol kio donis al vi malĝojon. Kiam vi malĝojas ree enrigardu en vian koron kaj vi ekvidos ke ververe vi priploras, kion vi ĝuegis.

Iuj inter vi diras : « Ĝojo pli fortas ol malĝojo » kaj aliuj diras : « Ne, pli fortas malĝojo ». Sed al vi diras mi, ke nedisigeblaj ili estas. Kunaj ili venas kaj kiam unu eksidas ĉetable sola kun vi, memoru, ke la alia dormas sur via lito. Verdire vi pendas, kiel pesilo inter viaj malĝojo kaj ĝojo. Nur kiam viaj platoj estas malplenaj vi estas senmovaj kaj en ekvilibra pozicio. Kiam la trezorgardisto vin levprenos por pesi sian arĝent- kaj orkvanton necesos, ke via ĝojo aŭ malĝojo sin levu aŭ sin mallevu.

Per la doloro frakasiĝas la ŝelo kiu envolvas vian intelekton. Samkiel la frukta kerno devas frakasiĝi, por ke ties koro povu baniĝi ensune, tiel vi devas sperti la doloron ; kaj se vi sukcesus teni vian koron ĝojmirigita pro la ĉiutaga miraklo de via vivo, via doloro montriĝos ne malpli mirinda, ol via ĝojo kaj vi akceptus la sezonojn super viaj koroj, samkiel vi estas ĉiam akceptintaj la sezonojn, kiuj superpasas viajn kampojn. Kaj vi serene maldormus trae de la vintroj de via malĝojo. Granda parto el via doloro estas de vi elektita. Tio estas la maldolĉa pocio per kiu la interna kuracisto resanigas vian malsanan mion kaj la pokalo, kiun li proponas, kvankam ĝi brulvundas viajn lipojn, estas tornita per la argilo, kiun la potisto malsekigis per la sanktaj larmoj siaj. Fidu do la kuraciston kaj eltrinku lian trinkaĵon en silentado kaj trankvilanimeco ĉar lia mano, kvankam peza kaj malmola, estas gvidata de la favorema mano de la Nevideblulo.

Via amiko estas la respondo al viaj bezonoj. Li estas via kampo, kiun vi ameme prisemas kaj dankoplene rikoltas. Li estas via manĝotablo kaj hejmo, ĉar al li vi direktiĝas dummalsate kaj al li sopiras porpace. Kiam via amiko eldiras sian opinion, nek timu la « nen » de via propra menso, nek la jeson rifuzu. Sed dum li silentadas via koro ne ĉesas aŭskulti lian koron. Tial, ke en amikeco ĉiu ajn penso, ĉiu ajn deziro, ĉiu ajn sopiro senparole estiĝas kaj mutaĝoje kundividiĝas. Kiam vi disiĝas de via amiko vi ne ĉagreniĝas ĉar tio, kion vi pli amas en li povas esti klara dum lia foresto, samkiel por la montogrimpanto pli hela estas la monto vidata el la ebenaĵo.

Kaj ne estu ajna celo en amikeco, krom spirita pliprofundiĝado ĉar la animo alion celanta, ol la malkovron de sia propra mistero ne estas amo, sed alĵetita reto kaj nur la senutilo estas kaptata.

Kaj la plejbono en vi estu por via amiko. Se li devos koni la malfluson de via tajdo, ties fluson li ankaŭ konu ĉar al kio utilas via amiko se vi iras al li renkonte por mortpasigi la tempon ? Ĉiam renkontu lin por la vivaj horoj ĉar estas lia rolo vian bezonon satigi, ne vian malplenon. Kaj en la mildeco de via amikeco kunridu kaj kundividu la plezurojn, ĉar en la roso de bagatelaĵoj la koro renkontas sian matenon kaj freŝon.

Kalil Gilbran trad. S. Boniol
(daŭrigota)

POR VIA DISTRO

Solvo de la antaŭa problemo


La neuzitaj literoj estas en cirkloj :

S	C	I	U	R	U	G	N	A	K	O	(H)
(I)	L	R	Ĉ	E	V	A	L	P	O	R	K
H	U	B	O	Ĝ	U	R	U	R	S	N	O
U	P	E	L	T	I	G	R	I	J	I	F
N	E	Z	A	U	A	R	(P)	N	G	T	K
J	(O)	T	B	(P)	T	R	A	L	E	O	N
C	L	A	U	T	A	R	I	F	(O)	R	I
A	L	K	B	(T)	V	R	E	C	M	I	L
N	U	(A)	I	A	(M)	(O)	J	P	U	N	P
I	M	A	L	N	E	L	A	B	S	K	L
R	E	M	A	M	U	L	M	A	Ĉ	E	U
E	L	L	E	M	A	K	A	(J)	B	O	V

Oni tiam povas legi : HIPOPOTAMOJ.

Nova problemo

KRUCVORTOJ (kun difinoj de F. Boyet).



Horizontale :

I. Tia celas esti Esperanto.

II. Ties frukto fariĝas legomo kaj elvokas la amon (R). Ĝi rilatas nek al eklezio nek al muzikaĵo, tamen ĝi sekvas la kanonon (R).

III. Antikve, ĝi estis sankta birdo (R) apud fama riverego.
Kemiaĵo, kiu ruĝigas lakmuson.

IV. Stato de multaj esperantaj societoj.

V. Prepozicio, kiun oni trinkas (R) en anglujo.
Plursignifa vorto ; ĝi servas por difini en gramatiko same kiel en muziko (franca-itala sistemo).
Scienca prefikso kiu duobligas aŭ religia estaĵo, kiu triobligas (R).

VI. Iamaj nomoj por ieaj imperiestroj.
Konstruaĵo fama en ludo, kaj ankaŭ, kiam ĝi rilatas al literoj.

VII. Valoraĵo serĉata en tero, kaj ankaŭ en borso, okaze de monaj krizoj.
Oni uzas ĝin inter vortoj, kiam la unua mezuras la duan.
Kvankam transitiva, tamen tiu verbo signas pasivecon (R).

VIII. Faka vorto por fizikistoj, tiu ago montras, por la poetoj, la influon de vento aŭ de dioj.

IX. En muziko ĝi kreas faman gamon, en matematiko, ĝi konkludas.
Tiu vorto povas signi la lokajn esperantistajn klubojn.

X. Tiaj estis la reguloj de la lingvoj antaŭ la lingvistika revolucio.

Vertikale :

1) Dank'al ĝi, oni konservas multajn kadukaĵojn.
Provi ŝajnigi la antaŭan kvalĵton (R).

2) Socia klaso, kiu regis dum jarcentoj pro milita povo.

3) Strebi al rekreado de objekto (R).
Ideala formo de tablo en diplomataj aranĝoj.

4) En feŭda sistemo, ĝi estis subigita.
Oni trovas ĝin surtere por ripozi kaj en la astroj por antaŭvidi (R).

5) Sufikso uzata por insulti kaj ankaŭ por karesi.
Ago evitinda sur la leonoj.

6) Oni parolas pri tio ofte (eĉ en tiu problemo), sed oni ne tiel ofte efektivigas ĝin (R).
Gemo diafane kolorita.

7) Aparta grupo de homoj, kiuj principe samcelas (R) ĉiel translokiĝi (ne necese ĉielen).

8) Arbo fama dumvintre.
Sufikso individua, ĝi fiiĝas, kiam ĝi memstariĝas.
Prefikso ; uzata interjekcie por instigi al laboro.

9) Ago kies rimedo estas la 3-a vertikala, kaj kies efiko estas distra kaj eduka.
Proprasence : efika ; figure efekta.

10) Arigos en sama homa grupo.
Interjekcio pri bedaŭro.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

PLURALO ĈE LA ADJEKTIVOJ :

ĈIUJ adjektivoj akordiĝas nombre (singularo kaj pluralo) kun la substantivo : (belaj okuloj -iliaj manoj- kiomaj horoj- tiaj vortoj — iaj personoj — neniaj serĉoj- ĉiuj libroj).

ONI NE KONFUZU INTER (ĉiu -tuta) (ĉiuj — tutaj)

— ĉiu infano sukcesis (ne la tuta infano) (la tuta vilaĝo estis detruita) (ĉiuj rimarkoj estis interesaj) (la ŝuldoj tutaj estis pagitaj).

Oni ne metas LA antaŭ propra nomo (aŭ sufiĉe difinita nomo)

— Esperanto estas lingvo por ĉiuj

— Romo estas granda ĉefurbo.

Malsamaj interesoj



Panjo, klarigu al mi : ĉiuj tiuj virinoj, kiuj estas en ĉiuj tiuj broŝuroj, kiu ci aĉetas estas ĉiam elegante vestitaj. Sed kial ĉiu tiuj broŝuroj, kiujn pacjo aĉetas estas plenplena je virinoj tute nudaj.

Maljusteco



Jam de unu horo, ili parolas, ili diskutis, ili klacas ; kaj kvankam mi preskaŭ krias neniu, el miaj paroloj ili aŭdas !

Danĝero tuja



Paĵo. kiu estas tiun sinjoron ? ĉu stelisto ? ĉu li prenis la elarĝentajn manĝilarojn de onklino Luiza ? Sed, atentu : ĉu ci estas certa, ke ci metis akvon en la revolveron ?

CERBUMU

Ĉiu teksto, sub la bidoj, entenas **tri erarojn.** La korektoj estos en la venonta numero de « Kulturaj Kajeroj ». Sed viajn proprajn korektojn vi povas sendi al S-ino Guillot, 5, rue René-Blanc, 74100 Annemasse (Francio).

La korektotaj eraroj en la antaŭa numero (« La Akcento ») estas la jenaj :

— A**kci**dento, m**an**, re**gi**

— **ĝ**enaĵo, salono**n**, e**n**iri

— ni, ti**un**, ni**aj**.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (200 aŭstr. ŝil.).
Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (400 fr.).
Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (5,00 pundoj).
Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (75 kr.).
Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (50 mk).
Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).
Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10e - D ALICANTE - (975 pes.).
Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).
Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Gorizia 17, 28100 NOVARA — p.k. 14321285 (12240 liroj).
Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).
Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).
Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (24 guld.).
Norvegujo : S-ino Louise Bœ Marmarvn 2A Oslo 11 (55 kr.).
Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (12 us. dol.).
Svedujo : Eldona Societo Esperanto, poŝtkonto 596768-2 216.11 Malmö (55 kr.).
Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (22 frs).
Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).
Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 1 de 1983, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

La plupart des arbres sont plantés. Dans quelques années nous devrions avoir des poires et des prunes pour les desserts de l'été. La petite pelouse devant la porte-fenêtre de la bibliothèque sera progressivement transformée en jardin fleuri ; un certain nombre d'arbustes sont déjà en place. Des hortensias egaieront les communs en complément des rosiers plantés l'an dernier. Les sommes destinées à ces achats ont été entièrement utilisées. J'espère que les donateurs ne seront pas déçus et que de nouvelles plantations seront faites l'an prochain.

L'environnement de la propriété s'est encore modifié. De nouveaux étangs ont été creusés entre la route de Baugé et le bois, mettant à mal le petit chemin perpendiculaire au bois, bien connu des promeneurs. Il a fallu réagir pour faire remettre les choses en l'état mais le paysage est pour l'instant changé, en mal. Il retrouvera parait-il un aspect agréable dans peu de temps. Acceptons-en l'augure.

L'organisation des stages se poursuit. Pour l'été tout semble bien s'annoncer. Pour la rencontre d'enfants, à Pâques, quelques difficultés se présentent. Une législation particulière régit les établissements recevant, hors année scolaire, des enfants de moins de seize ans non accompagnés de leurs parents. Il nous faut donc demander l'habilitation nécessaire. Les dossiers à remplir ne sont jamais simples. Il faut faire face à un certain nombre d'exigences non seulement concernant les locaux mais aussi la qualification de l'encadrement. Nous espérons que tout sera en ordre pour la fin du mois de mars.

Les demandes de renseignements et les inscriptions arrivent comme d'habitude mais il est évidemment trop tôt pour dire ce que sera l'été 1983. Il est probable que comme les années précédentes, le rythme s'accentuera à partir du mois d'avril lorsque les intéressés n'auront plus à penser aux vacances d'hiver. N'attendez tout de même pas trop longtemps pour penser aux vacances d'été.

P. BABIN.

INTER NI

La pli granda parto de la novaj arboj kaj arbetoj estas plantitaj. Post kelkaj jaroj ni espereble povos meti sur la tablojn pirojn kaj prunojn el la ĝardeno. La malgranda herbejo kiu etendiĝas antaŭ la granda pordo de la biblioteko iom post iom fariĝos florĝardeno. Jam kelkaj arbetoj estis plantitaj tie. Hortensioj ornamos la eksterajn murojn de la laborĉambroj komplemente al la rozarbetoj plantitaj lastan jaron.

La ĉirkaŭaĵo de la bieno denove ŝanĝiĝis. Novaj lagetoj estis elfositaj inter la vojo al Baugé kaj la arbaro. La vojeto, kiu kondukas de la arbaro al la ĉefvojo suferis kaj ni devis protesti. Ŝajnas, ke baldaŭ ĉio estos en ordo. Sed la pejzaĝo ŝanĝiĝis, ne agrable. Oni asertis al ni, ke ĝi multe plibeliĝos post kelka tempo.

La organizado de la ĉijaraj aktivaĵoj daŭre progresas. Ĉio iras glate, krom koncerne la Renkonto de Infanoj okazonta dum la Paskaj Ferioj. La leĝaro pri akcepto de infanoj ne akompanataj de la gepatroj, ekster la lerneja tempo estas iom komplika. Ni esperas, ke ankaŭ sur tiu tereno ĉio estos en ordo fine de marto.

La informpetoj kaj aliĝoj venas laŭ la kutima ritmo. Tre verŝajne tiu ritmo plirapidiĝos ek de marto, kiam la vintraj ferioj apartenos al la pasinta tempo. Sed ne tro atendu por pensi pri via somera libertempo.

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE — LIBRO-SERVO

Commander à Jeanine VINCENT — B.P. 54 — 49150 BAUGE

Chèques établis au nom de la MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE

C,C.P. nº 1485-39 P — NANTES

BANQUE : B.P.B.A. NANTES 58019 02570 9

Prix franco au-dessus 100 frs.

Nos prix sont indicatifs

1 — LIVRES D'ETUDE

Abrégé pratique de grammaire (ICEM)	8,00
Amuzaj dialogoj (Lienhard)	36,00
Cours sur disque « Tra la Mondo » (Ribot) avec 7 livrets d'accompagnement (même prix avec cassette)	130,00
Baza Kurso de Esperanto (A.C.E. Childs-Mee)	15,00
Ĉu vi parolas tendare ?	15,00
Gramatika Gvidlibro (G.E.E.)	10,00
Gvidlibro por la ekzamenoj	4,00
Gvidlibro por superaj ekzamenoj (Pechan)	40,00
Initiation théorique (Denoel)	35,00
Junulkurso (SAT)	25,00
Supplément	5,00
5 disques	35,00
Kiel diri ? (Lentaigne) (5000 expressions)	15,00
Ludoviko en Nederlando (Delaire)	60,00
Manuel d'étude (J. Couteaux)	7,00
Manuel de Perfectionnement (J. Couteaux)	7,00
Manuel d'Initiation (B. Thaillet)	6,00
Metodo 11 + 10 livrets : livre du Professeur	300,00
Ni parolu en Esperanto + corrigés	8,00
Nos premiers pas en espéranto et disques	4,00
Nouveau cours rationnel (SAT)	40,00
Parler l'espéranto (Volpelière)	20,00
Paŝoj al plena posedo (Auld) progresiga libro	40,00
Petro — kurslibro por laboristoj	5,00
Plena analiza gramatiko (Waringhien)	125,00
Por la Praktikantoj (Babin) lernolibro por progresantoj	25,00
Précis grammatical	4,00
Premier manuel	4,00
Privilegia Vojo (Setälä) — rektmetoda kurso	20,00
Proverbaro franca-esperantista	10,00
Réglements et Programmes d'examens de FEI	1,50
Sub la verda Standardo (Korte) por la infanoj : Laborilo 1	25,00
— 2	25,00
Gvidlibro por la instruisto	10,00
Texte de préparation à l'A.P.K.	10,00
Corrigés	5,00

2 — DICTIONNAIRES ET LEXIQUES

Dictionnaire français - Espéranto (Léger - Albot)	28,00
Dictionnaire pratique (Fr-Esp. et Es.-fr)	60,00
Dictionnaire de poche	15,00
Grand dictionnaire Esp.-Fr. (Waringhien)	70,00
Konversacia vortaro (Cseh)	5,00
Lexique fondamental (Léger)	10,00
Oportuna Vortaro de Ordinara Esp.	20,00
Praktika Bildvortaro (1500 terminoj)	36,00
Plena vortaro kun suplemento	60,00
Plena ilustrita vortaro	260,00
Vocabulaire Esperanto (Duc Goninaz) laŭtena	15,00

3 — LINGVO kaj MOVADO

ABC de Esperanto (Waringhien)	8,00
Amuzaj dialogoj (franca lingvo)	36,00
Aŭtografoj de L.L. Zamenhof	4,00
Aventuroj de pioniro (Privat)	22,00
Bulonjo 1905 (Ribot)	4,00
Docteur Esperanto (le) (Zidkowska) en Fr.	10,00
Elektitaj paroladoj (Lapenna) pri la movado kaj la lingvo	45,00
Espéranto (l') (Janto)	20,00
Espéranto (l') dans l'enseignement (P. Denoel)	15,00
Espéranto (Bibliothèque de travail)	10,00
Esperanto en Perspektivo enciclopedia givlibro	190,00
Esperantonimoj	20,00
Facetoj de esperanto (Auld) Eseoj pri poezia lingvaĵo	12,00
Falsaj amikoj en Esperanto (Bernard-Ribot)	4,00
Fundamento de Esperanto -gramatiko, ekzercaro, vortaro broché	20,00
— relié	28,00
Gvidlibro por supera ekzameno (Pechant) kompendio pri la movado kaj ties historio	40,00

Une humanité, une langue (S. Glodeau) 6,00
Historio de Esperanto (Courtinat) 75,00
Homaranismo (Zamenhof) 4,00
Lingvaj respondoj (pri leksikologiaj gramatikaj demandoj) ..... broché 15,00
..... relié 18,00
Lingvistikaj aspektoj de Esp. (J. Wells) 28,00
Planlingvaj problemoj (Gilbert) kompara interlingvistiko 28,00
Pri Esp. tradukarto (F. de Diego) 25,00
Pri lingvo kaj aliaj artoj (Auld) 15 eseoj 48,00
Pri la internacia lingvo dum jarcentoj (Mag. Dratwer) 75,00
Une langue internationale (Rougetet) 5,00
Une approche de la langue internationale (U.F.E.) 5,00
Tu seras Espérantiste (Delaire) 6,00
Zamenhofa Esperanto (Simpozio pri ata-ita) 50,00

4 — ROMANOJ — NOVELOJ — RAKONTOJ

Amara pano (Darvas) 10,00
Anni kaj Montmartre (R. Sschwartz) romano originala 28,00
Aster.ks la Gaŭlo — amuza bildstria rakonto .. 38,00
Baza literatura krestomatio 30,00
Besto farmo (La) (Orwell) fablo pri revolucio kaj ties sekvoj 15,00
Ciu-Ĉiun (Jung) memoraĵoj de la fondinto de Heroldo de Esp. 80,00
Ĉu li venis trakosme? (Valano) orig. krimromano 55,00
Deklinga fuĝas (T. Adema) fantazia humura romano 20,00
Dia avarulo (La) (Dobraczynski) biografio de Pastro Kolbe 25,00
Dro Dorner (Egerrup) originala romano pri arta gravedigo 30,00
Dona Barbara (R. Gallegos) latinamerika literaturo 40,00
Dorse kontraŭ la muro (P. Wybenga) dummilitaj spertoj 24,00
Dudek kvin jaroj antologio de belartaj konkursoj 25,00
Ekzistencialistaj herooj (C. Llech-Walter) dulingva tezo 10,00
El la vivo de Bervala sentaŭgulo (Beaucaire) (maldeceta epizodaro) 25,00
Eriko kaj vipuro — de infanoj por infanoj 10,00
Fabelo pri bela suneto — de infanoj por infanoj 10,00
Fabeloj de la verda pigo 50,00
Fianĉo de l'sorto (Rosbach) originala romano .. 48,00
Filoj de l'ŝtonkora homo — bildstria adaptaĵo de romano 18,00
Foĉjo kaj Ozak — de infanoj por infanoj 10,00
Forkaptita (R.L. Stevenson) aventurromano 30,00
Fundamenta Krestomatio — por la seriozaj studantoj 50,00
Gaja leganto per Esperanto (Schwerin) 6,00
Geknaboj de Grésillon 22,00
Granda Kaldrono (la) (J. Francis) originala romano 95,00
Gudrun (J.V. Jensen) amromano de Nobelpremiito 30,00
Ĝardeno de la urbestro (L. Gabrielli) aŭtobiografio novelaro 25,00
Hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ (B. Golden) 35,00
Hungaraj fabeloj 22,00
Islandaj pravoĉoj — traduko de tri rakontoj kaj unu poemo 25,00
Japana kvodlibeto — poemoj kaj prozoj kun japana etoso 18,00
Junaĝa verkaro (Privat) — prozajoj, poemoj, teatraĵo 18,00
Kato en la sako (la) de diversaj aŭtoroj — noveloj — eld. en Hungario 8,00
Kain kaj Abel (Sandor SZATHMARI) 38,00
Kanako el Kananam (K.G. Linton) instruriĉa originala rakonto 25,00
Kara diablino (Boatman) misterromano 30,00
Karlo (Privat) interesa infanliteraturaĵo 6,00
Kaŭkazaj rakontoj .....
Kie boacoj vagadas (E. Salovaara) originala novelkolekto pri la vivo de la Laponoj 15,00
Koko krias jam (F. Szilagyi) orig. noveloj 35,00
Kontraŭflue 15,00
Kredu min Sinjorino (C. Rosseti) aŭtobiografia romano 20,00
Kruko kaj Baniko el Bervalo (Beaucaire) maldeca anekdotaro 38,00
Kumeŭaŭa (T. Sekelj) aventuroj inter indianaj triboj en Brazilo 24,00
Kun siaspeca spico (Schwartz) antologio el humuraĵoj 30,00
Leo Tolstoj (Lebrun) — verkita de la persona sekretario 85,00
Libro de Amo 65,00
Liliputo (J. Swibt) 15,00
Libro de Romanoj (Vilmo Benczik) 35,00
Marta (E. Orzesko) unu el la famaj tradukoj de Zamenhof 22,00
Metropoliteno (V. Varankin) unu el la Ĉefverkoj 55,00
Mi amis Junulinon (Trobsisch) 20,00
Mi estas Pelé (aŭtobiografio de la futbalreĝo) de Brazilo 30,00
Misio sen alveno (J. Francis) 70,00
(scienc. fikcia romano)
Mist. Tot aĉetas mil okulojn (J. Forge) detektivromano 38,00
Naskiĝo de Esperanto-Domo (historio de la Esperanto-Domo Grésillon) 10,00
Nekonata konato (Boatman) originala misterromano 20,00
Neologisme (Lorjak) originala verketo en sprita lingvaĵo 28,00
Ne plu ludo (Barthelmes) originalaj noveloj 15,00
Nezha kirlas — ĉina ilustrita libro 30,00
Noktoj (Sire) alegoria bildstria rakonto 10,00
Normandaj rakontoj (Maupassant) majstra traduko 36,00
Nova butikisto de Nukugaia (B. Potts) amuzaj noveloj 35,00
Nuda inter lupoj (Apitz) el la koncentrejo Buchenwald 30,00
Okupacio (E. Krustan) la germana okupacio en Estonio 6,00
Perdita honoro de iu K. Blum (La) (H. BOLL) protesromano pri sensacia ĵurnalisto 38,00
Perdita vizaĝo (la) (J. Nesvabda) siencfikciaj rakontoj 12,00
Petro Schlemil (Chamisso) la viro kiu forvendis sian ombron 6,00
Raymond Schwartz (R. Bernard) 15,00
Rakontoj el unua poŝo (K. Capek) 30 00
Saltego trans jarmiloj (J. Forge) Humura romano 28,00
Satiroj (F.V. Dorbo) humura novelaro 33,00
Servokapabla (G. Eckoud) belgaj rakontoj 5,00
Sunkrono (la) (M. Koenen) 10,00
Tartarin de Taraskono (Daudet) fantazia satiro 20,00
Tinĉjo 25,00
Tra dezerto kaj praarbaro (Sienkiewicz) geknaboj en Norda Afriko 52,00
Trans la fabeloceano (Szilagyi) por infanoj kaj plenaĝuloj 25,00
Trigroŝa romano (B. Brecht) socikritika romano 60,00
Tri verkoj de Volter (trad. Lanti) 38,00
Vage tra la dimensioj (K. GAKU) (originalaj sciencfikciaj rakontoj) 18,00
Venis viro (T. Nelsen) krimromaneto 18,00
Vojaĝoj al Kazohinio (S. Szathmari) kvazaŭ nova Gulivermondo 35.00
Vizaĝoj 15,00

(à suivre).

Le prix de l'abonnement

à « **Kulturaj Kajeroj** »

est modifié

à partir du 1er janvier 1983

et passe à **60 francs** par an

Pour vos lectures
et vos cadeaux de fin d'année

offrez un chef-d'œuvre
de la littérature française
magistralement traduit

NORMANDAJ RAKONTOJ

de **Guy de Maupassant**

Traduit par Roland DUPUIS
Illustré par R. PINCHON

★

Prix : 36 francs

— **Rabais à partir de 3 exemplaires** —

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue.
Cours et corrections : 100,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue.
Cours et corrections : 100,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entrainement à un cours supérieur : versions thèmes, étude de textes.
Cours et corrections : 70,00 F.
Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

★

Régler les cours par un chèque à part
C.C.P. : 1485 39 P Nantes

Les extraits de notre catalogue

En 1961 a paru la traduction en françaisdu livre

PRINTEMPO en la AŬTUNO

de Julio Baghy

Les exemplaires restants ont été mis à notre disposition par la traductrice Irène Marsy.

Prix de l'exemplaire : **15 francs**

Les sommes recueillies serviront à abonner à « Kulturaj Kajeroj » des espérantistes du Tiers-Monde.